



LEGI



Ili povos fortranĉi la florojn



sed ili ne povos
haltigi la printempon.

Pablo NERUDA

ESPERANTO-GIRONDE

KUNVENO en Palmer

la 30an de JANUARO 2022

je la 10a 30



Ĉeestas: Jean-Seb Brilleaud, Elvezio Canonica, Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin, Martine Edelbloude, Gloria Gargallo, Lucienne Laroche, Bernard Sarlandie, Maeva Sarlandie, Rose Sarlandie.

Senkulpigataj: Karima Choukairi, Christiane kaj Michel Jagueneau, Klodin' Pomirol, Marcelo Redoulez.

Elvezio salutas kaj bonvenigas ĉiujn.

1. Translokiĝo de Esperanto-Gironde

Bernard: Ne havis pozitivan respondon de Lormont. Nenia ebleco kunveni dimanĉe kaj trovi lokon por kvar ŝrankoj. En Le Haillan lia asocio uzas lokon en asocia domo, sed estas nur unu ŝranko por ĉiuj asocioj. Eblas uzi la lokon dimanĉe. En Mérignac estas domo de la asocioj, sed ne estas loko por la arkivo.

Yannick: Eble la arkivo povus esti metita en arkivejon departementan (Cours Balguerrie Stuttenberg) aŭ urbaran (apud Sud Ouest), aŭ eĉ de Bordojo.

Bernard: La responsulino de la departementa arkivejo estas la filino de Claude Vatican, kiun li povos kontakti.

Eble la arkivo povus interesi ankaŭ la arkivejon de la Laborborso. Bedaŭrinde la konstruaĵo estas en tre malbona stato.

Gloria: Eble la urboj Latresne aŭ Camblanes estus interesataj. En Lormont la domo de la asocioj estas fermita dimanĉe.

Yannick: Pri la ŝanĝo de la sideja adreso: ĝi povas esti ĉe la urbodomo aŭ ĉe la prezidanto (sed oni devas ŝanĝi ĝin, kiam oni ŝanĝas la prezidanton).

Martine: Andreo lasis tri skatolojn da libroj por la universitato.

Pri Brassens: Restas 37 libroj (+ eventuale, tiuj, kiuj kuŝas ĉe Marcelo). Estis donacitaj 35. Iom post iom alvenas mendoj.

En la kaso: preskaŭ 3000€ (en la banko).

Ĝis nun neniu sendita libro estis perdita. Alvenis gratulaj mesaĝoj.

Elvezio: Clément plu laboras en UEA en Roterdamo; kunlaboras en la libroservo. Eble ili povus mendi unu-du Brassens-librojn (ne por vendi)?

Kurso en la universitato: ne multaj studentoj. Unu regule venas. Okaze de la Lingvo-festo estos reklamo por la kurso proponota venontjare.

Martine: Oni povus mendi reklam-materialon.

2. Brasensa libro

Yannick: Eble oni povos proponi Brassens-libojn dum la interasocia kongreso en Trelissac (26a-29a de majo).

Elvezio: Clément intencas partopreni en tiu kongreso (Espéranto-Jeunes)

Yannick: Eble Marcelo intencas fari prezenton de la libro dum la kongreso.

Janine: Ĉu oni povus donaci ekzempleron al la Brassens-Muzeo de Sète?

Bernard: Iu Café des Langues devus okazi en Le Haillan. Bernard Esperante partoprenos.

Elvezio: Dankas pro la ĵus publikigita LEGI.

Bernard: Transsendas ĝin al Grekio kaj Israelo.

Janine: La numeroj 138 ĝis 165 estis senditaj al la Nacia biblioteko de Hispanio. La sekvaj estos.

Martine: Ĝis nun 13 aliĝintoj al la asocio (estis 25 en 2021).

Ekzistas katalogo de la vendeblaj libroj kaj iu de la libroj apartenantaj al Esperanto-Gironde (ne vendeblaj).

Yannick: Proponas reordigi la katalogon de Esperanto-Gironde, laŭ tiu de Kvinpetalo, kiun ordigis Philippe Cousson, emerita bibliotekisto.

Jean-Seb: Esperanto-Créon proponas ludkartaron («10 familioj») laŭ temoj de la ĉiutaga vivo. La prononco de ĉiu vorto estas indikita.

Janine: Ŝajne temas ne pri «ludo por lerni Esperanton», kiel reklamite sur la retejo, sed pri ludo por akiri vortojn pri diversaj temoj. Ne estas slipo pri la gramatiko de la lingvo aŭ por elfari frazojn.

Pri la skatoloj da libroj de Andreo: Elvezio petos de la universitato, ĉu li povos meti ilin en la lingvo-bibliotekon.

La kunveno finiĝas je la 12a.

Post la tagmanĝo, kiam ni estis forirontaj, alvenis du gejunuloj, ambaŭ studentoj en Montaigne, kiuj interesiĝas pri Esperanto, kaj jam komencis ĝin lerni. Elvezio rendezuis ilin la sekvontan mardon, en la salono, kie okazas la Esperanto-kursoj.

La venonta kuveno okazos la 6an de marto en Palmer.



Elvezio kaj Martine foliumas la katalogon

Janine

ESPERANTO-GIRONDE

KUNVENO en Palmer

la 06an de MARTO 2022

je la 10a 30



Ĉeestas: Jean-Seb Brilleaud, Elvezio Canonica, Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin, Martine Edelbloude, Klodin' Pomiroł, Marcelo Redoulez.

Senkulpigitaj: Gloria Gargallo, Christiane kaj Michel Jagueneau, Lucienne Laroche, Bernard Sarlandie, Rose Sarlandie.

Elvezio salutas kaj bonvenigas ĉiujn.

1. Helpe al Vinilkosmo post la inundo

Esperanto-Gironde donacas por Clément abonon al Vinilkosmo. Li donis al Marcelo kaj Klodin' sian retadreson, tiel ke nun la abonpago povas esti sendita al Vinilkosmo.

El mesaĝo de Marcelo la 5an de februaro:

La 13an kaj 14an de januaro la rivero L'Hers transbordiĝis kaj inundis la parton de Donneville (31), kien la aŭtoŝosea digo gvidis ĝin: t.e. ĝuste ĝis la hejmoj de Flo kaj de lia frato Liberto! Unuan fojon en sia vivo Flo konstatas inundon tie. En la nokto la akvo tre rapide alfluis kaj inundis la lokojn, loĝejojn, buroon kaj artestejojn.

De tri semajnoj, helpate de sia filo kaj kelkaj amikoj, Flo batalas kontraŭ la akvospuroj. Ĉar kvankam nun ŝajne la akvo estas pelita el la konstruaĵoj, postrestas multe da laboro antaŭ ol sekigi ĉion, kaj plej grave la murojn, kiuj pro kapilareco malsekiĝis ĝis 1,60m alte. La dosieroj por la asekujoj ankoraŭ ne estas finpretigitaj...

Se vi pretas helpi, ĉia kontribuo estos bonvena. Flo sugestas, ke bonkore kiel plej multe da homoj aliĝu al la ABONKLUBO de Vinilkosmo.

<https://www.vinilkosmo-mp3.com/fr/vinilkosmo-abonklubo/abonnements-abonklubo.html>

Kaj laŭpove, menciante «subteno post inundo» abonu kontraŭ 10€, 20€, 40€, 60€, ... ĝis 500€. Elektu mem laŭ viaj financoj.

Mi proponas, ke nia asocio Esperanto-Gironde subtene pagu unu aŭ du 150€ajn abonojn ekzemple por Clément (kaj por la Universitato?). Ĉu vi konsentas?

2. Translokiĝo de Esperanto-Gironde

(1) Per retmesaĝo Bernardo informis, ke li kontaktis Agnès Vatican, direktorinon de la Departementa Arkivejo. Ŝi ŝajne favoras akcepti nian arkivon. Sed oni devas scii, kiujn partojn ŝi konsentus ricevi (ĉu nur administrajn dokumentojn, ĉu malnovajn revuojn ktp.?). Ne ekzistas protokoloj de la kunvenoj antaŭ 1986.

Oni devas listigi pli precize la entenon de nia arkivo: kiu? Kiam? Estos tre impona laboro: ni devos plani kunvenon, dum kiu ni faros nur tion. Ekzistas malnova listo, nekompleta.

Antaŭ ĉio, oni devas renkonti Sinjorinon Vatican por scii, kion ni povus lasi en la arkivejo, kaj kiel procedi. Janine verku leteron por rendevui ŝin iun lundon post-tagmeze, kaj Bernardo ĝin sendos al ŝi.

La problemoj estas, ke la dokumentoj ne estos same facile konsultebaj. Ne ofte oni bezonas fari, sed ekzemple Marcelo bezonis esplori malnovajn revuojn por artikolo en *Sennaciulo* pri presdesegnoj. Okaze de kurso, li povas bezoni serĉi fotojn aŭ dokumentojn ĉirkaŭ 6-fojojn jare.

Christian Lavarenne iam venis por esplori en nia arkivo.

Ni devos decidi, ĉu ni fordonos ĝin aŭ restos posedantoj.

La risko estas, ke ili povos decidi detruiri niajn dokumentojn, se ili bezonos lokon.

(2) Komence de marto, Gloria sendis leteron al pluraj urboj sudoriente de Bordoza por peti, ĉu la asocio povus esti gastigita en unu el ili, sed ĝis nun ricevis neniun respondon.

Marcelo kaj Klodin' renkontis Céline Dotigny, direktorinon pri kulturo en Cenon. Ŝi kontaktos la koncernatojn de la translokigo en marto. Ŝi jam proponis kunveni lunde en la urba biblioteko, kiu ne estas alirebla al publiko en tiu tago. Ŝajnas, ke ne estus bona ideo, peti de ili, ĉu ili povus gastigi la librojn de nia biblioteko, ĉar la libroj ne estas longtempe konservitaj.

3/ Novaĵoj pri Brassens

Yannick: En la sabata suplementa revuo de Sud Ouest antaŭ du semajnoj estis artikolo pri retejo dediĉita al Brassens, kreita de Pierre Schuller. Tiu retejo estas vera trezoro. Yannick skribis al P. Schuller kaj telefone parolis kun li pri nia projekto. Ĝi tre interesas lin. Li bone konas la nevon de Brassens, Serge Casani, kiu zorgas pri la moralaj rajtoj de la verkaro de Brassens. S. Casani donis la nomojn de la respondeculoj ĉe Warner kaj Universal. Yannick ilin kontaktos. Estas interese, ke P. Schuller sendas du fojojn monate novaĵleteron al pli-malpli 1400 abonantoj.

Nun la kostoj de la unuaj du centoj estas amortizitaj.

Do ni povas, por la sekva centoj (aŭ ducentoj) rekomenci kvazaŭ ni antaŭe farus nenion. La nuraj kostoj estos tiuj de la kopirajtoj, t.e. malpli ol 6€ por unu libro, al kiu oni aldonu 1/3 de la vendoprezon por la distribuistoj kaj unu parton por la disvendistoj.

Gloria portas mem siajn librojn al la librovendistoj, kiuj finfine resendas tiujn nevenditajn.

Tamen ne la francajn librovendistojn ni celas, sed la libroservojn de UEA ktp., kaj la retlistojn de la Brassens-ŝatantoj. Eble la muziklibro-vendistoj povos esti interesataj.

Marcel: Pri Trelissac, ni scios nur post la organiza kunveno de la 11a de marto, ĉu estos invito por prezenti la libron okaze de la plurasocia kunveno (fine de majo).

Martine: Ĉar restas ĉirkaŭ 3000 € sur la bankokonto, oni povas presi plian centon.

Marcelo: Eric Elliard (SAT-Amikaro) aĉetos dek pliajn, kaj Blaise Guinin ricevos tri al li promesitaj je ĉiu centon. Presado kaj liverado okazas en du semajnoj. Do oni povas presigi po centon laŭbezone.

Yannick: Por nova presado, necesos nur aldoni la kopirajtajn menciojn por ĉiu kanzono kaj la ISBN-numeron. Oni devos certigi ĉe ambaŭ firmaoj, ke ili ja komprenis, ke ni celas eldoni libron kaj ne KD-on. P. Schuller petis, ke oni sendu al li unu ekzempleron de la libro.

4/ Aliaj aferoj

(1) Festo de la lingvoj

Elvezio: La Festo de la lingvoj ne okazos ĉijare.

Martine: Ni jam ricevis multajn kalendaretojn. Oni devos ilin disdoni en la universitato. Cetere Espéranto-France petis, ke ni malfermu konton ĉe ili, por pagi la sendokostojn.

(2) Situacio en Ukrainio

Marcelo korespondas kun Volodimir Hordijenko, landa peranto de Pasporta Servo en Ukrainio, en Kijivo. La unua penso estas tuja bezono: se inter la forfuĝintoj estas Esperantistoj, kiel ilin kontakti kaj venigi ?

Cetere mesaĝo estis dissendita al la Kompanoj, inter kiuj pluraj respondis, ke ili povas gastigi. Chris Powis partoprenis en la IJK (Internacia Junulara Kongreso) en Kijivo en 2011. Ŝi sendis al Marcelo la liston de la partoprenintoj, kun retadreso kaj telefonnumeroj de ĉiu. Multaj partoprenintoj estis el Rusio. Ĉu sendi mesaĝon al la Ukrainoj? Tio povus ilin endanĝerigi.

Cetere Fabrice dissendis mesaĝon el la helposervo de UEA (vd p.11). UEA transprenis la rolon komunikigi la homojn helpobezonajn kaj helpopretajn.

La kunveno finiĝas je la 16a 30.

Janine



HELPOĈENO ĈE ESPERANTO-GIRONDE

Sabaton la 26an de februaro, Marcelo kaj Klodin' sendis tiun ĉi retmesaĝon al pluraj ricevontoj, inter kiuj membroj de SAT kaj de la Kompanoj.

Saluton,

Nin tre ĉagrenas kaj maltrankviligas la milita situacio en Ukrainio. Antaŭ dek jaroj ni vizitis ankaŭ Kijivon kaj estis kore akceptitaj de tieaj esperantistaj gejunuloj. Jam tiam, dum la kongreso en Jalto, ni frontis al interna konflikto tia, kian mi antaŭe neniam ĉeestis. Inter esperantistoj pro naciemaj sentoj.

La hodiaŭa situacio estas tragika. Ni konfesas, ke ni ne scias, kion fari sed ni ŝatus konkrete agi niaskale. Ni pensis ekzemple akceptante esperantistan familion, kiu sukcesis migri. Sed kiel tion sciigi?

Ni memoras la belan ekzemplon de la SAT-Amikara grupo de Saint-Nazaire, ĉirkaŭ Ferdi kaj Janine Vince, kiuj aktivigis lokan komitaton dum la Sarajevo-sieĝo.

<https://www.sat-amikaro.org/presse-ocean-2-mai-2009-hommage-a-ferdi-vince>

Ĉu iel tiu ekzemplo povas inspiri nin por tuja reago praktika por ukrainaj esperantistoj? Por efika helpoĉeno.

Unua demando: Kiel kontakti ilin?

Ni hezitas uzi la retejon de Pasporta Servo por proponi tiun helpon. Eble ĉar ne kongruas kun la celo de la retejo sed ĉefe ĉar ni ne scias, ĉu tio minacas endanĝerigon de la koncernatoj.

Ĉu vi havas ideon? Ĉu vi jam konas alireblecon?

Marcelo kaj Klodin'

La 7an de marto, ili sendis novan mesaĝon, kiu montris, ke progresas la afero.

Gekaraj,

Depost nia kolektiva mesaĝo ni rekte kontaktis Volodimir, respondeculo de Pasporta Servo en Ukrainio.

Hodiaŭ posttagmeze nin trafis lia dua mesaĝo. Jen unua kun gastigopeto.

Vi legu ĝin ĉi-sube kun nia rapida respondo al li.

Ni laŭetape plu informos vin.

Ĉu vi havas demandojn? Ne hezitu reagi kaj proponi.

Ni mem pretas akcepti du personojn. Kaj preferu ne bebon.

Solidarece,

Marcelo kaj Klodin'

De: Marcel&Claudine <marcel.redoulez@wanadoo.fr>

Objet: Rép.: El Volodimir: Re: Helpoĉeno

Date: 7 mars 2022 à 17:41:19 UTC+1

À: Pasporta Servo <saluton@pasportaservo.org>

Kara Volodimir,

Ankoraŭ ne venis al ni gastigopeton. Intertempe ni kontaktis esperantistajn geamikojn en Francio kaj tri aliaj ankaŭ pretas gastigi paron aŭ familion. Sed ne en proksimaj urboj.

Tial ni diskonigas al ili niajn interŝanĝojn.

Ni havas kelkajn demandojn rilate viajn kontaktojn:

Tri virinoj: ĉu el la sama familio? Patrino + du filinoj + 5-monata nepo? Ĉu ili konsentos vivi: 2 virinoj en Bordojo kaj la patrino kun la bebo en alia urbo?

Ĉu ĉiuj parolas esperanton?

Ĉu ni povas rekte kontakti ilin?

Ĉu ili jam transpasis la landlimon? Kie? Ĉu en Pollando? Rumanio?

Dankojn pro viaj klopodoj,

Marcelo kaj Klodin'

Le 7 mars 2022 à 16:21, Pasporta Servo <saluton@pasportaservo.org> a écrit:

Pasporta Servo

Volodimir skribis al vi!

Karaj Marcelo kaj Klodin',

Se ankoraŭ vi ne trovis ukrainajn e-refuĝintojn, mi povas direkti al vi 3 sinjorinojn kaj 5-monatan bebon?

Koran dankon pro la respondo!

Fartu bone!

Amike, Volodomir.

Sabaton la 26an de marto, alvenis nova mesaĝo de Marcelo kaj Klodin'
Sukcesa helpoĉeno por la familio Gradzion

Gekaraj,

Dank' al efika helpoĉeno inter esperantistoj Valentyna, Katya ŝia filino, Jana ŝia bofilino kun Anna ties sesmonata bebo, sukcese traveturis Eŭropon de Kijivo al Bordojo.

Survoje gastigis ilin Elizabet en Varsovio, Gary kaj Feliks en Berlino, Guy kaj Eriko en Parizo.

Post naŭtaga itinero la familio Gradzion finfine alvenis en nia hejmo lastan lundon vespere.

Kaj tuj ili aktivis.

Jam la morgaŭon, mardon, je la 7:30 Valentyna perrete gvidis siajn kursojn pri Ukraina lingvo kaj literaturo al siaj gelernantoj inter 11 kaj 18-jaraj.

Ekde ĵaŭdo Katya entuziasme eklaboris en la kuirejo por anstataŭi malsanan laboristaron dum du semajnoj.


Jana zorge edukas sian filinon.

Kaj nia trankvila domo iĝas vivoplena.

Hieraŭ la vilaĝestrino oficiale akceptis ilin nome de la franca respubliko.

*Multajn dankojn pro viaj subtenoj kaj apogoj,
Solidarece,*

Marcelo kaj Klodin'



Merkredon la 30an de marto, alvenis nova mesaĝo de Marcelo kaj Klodin':
Gekaraj,

Eble ankaŭ vi favore respondis al la gastigopeto de Svetlana, e-lernantino de Volodimir, la edzo de Valentyana Gradzion, kiun ni gastigas de dek tagoj.

Svetlana hodiaŭ informis nin pri sia decido trajni de Berlino, kie ŝi ripozis kelkajn tagojn, al Parizo venontan sabaton. Tie ŝi jam havas kontakton por tranokti. Kaj fine inter diversaj proponoj, ŝi elektis esti gastigata en Tuluzo. Ja Kijivo kaj Tuluzo estas ĝemelaj urboj.

Jen denove bela ekzemplo de esperantista solidareco.

Ni bondeziras agrablan restadon al Svetlana kaj ŝiaj gefiloj.

Solidarece,

Marcelo kaj Klodin'

Demande d'hébergement - Gastigopeto

Saluton!

Mi estas Svetlana. Mi estas el Kijivo, Ukrainio. Mi havas du infanojn, filino Diana 7 jaroj kaj filo Bohuslav 9 jaroj. Mi esperantistiĝis en la jaro 2005. Mi estis unu el organizantoj de IJK en Kijivo en la jaro 2011. Ni estas amikema familio, ŝatas vojaĝi, promeni, studi novajn kulturojn. Mi scipovas paroli la francan, anglan lingvojn, Esperanton. Mia filino tre ŝatas kanti, pentri, estas kreema knabino. Mia filo ŝatas matematikon kaj ludi piedpilkon. Nuntempe estas milito en nia lando, tre malfacila situacio, pro tio mi planas veturi en Europo. Mia edzo restos en Ukrainio kiel ĉiuj viroj dum milito. Li kaj mi nuntempe ne havas laboron, kiel multaj homoj en Ukrainio pro milito, do vere ne certas pri estonto. Mi ege ŝatas Francion kaj francan lingvon kaj estus feliĉa pasigi tie iom da tempo dum ĉio finiĝos.

- Retpoŝto: svkozarenko@gmail.com

- Facebook: Svetlana Kozarenko

- Signal: +380957034102

Lastminuta informo: Pluraj respondoj atingis Svetlana-n. Kaj el Berlino ŝi dankis la gastemajn francajn esperantistojn kaj elektis hejmon en Tuluzo, ĝemelurbo de Kijivo.



Ekskluzive por ESPERANTO-GIRONDE
Okaze de nia venonta grup-kunveno
SABATON la 23an de aprilo 2022
teatro Simone Signoret - 1 avenue Carnot
apud la urbodomo de CENON

Prelego de
Valentyna Gradzion
Instruistino el Kijivo



Venu multnombraj

Afiso Yana Gradzion

La même conférence pour tout public
avec une traductrice officielle de la préfecture
JEUDI 5 MAI 2022 à 18h
Même salle Simone Signoret - 1 avenue Carnot
A la mairie de CENON

Gazetaraj Komunikoj de UEA

N-ro 1026

2022-03-05

HELPO-SERVO DE UEA KAJ TEJO RESPONDE AL LA MILITO EN UKRAINIO

Pasintsemajne la mondo en ŝoko atestis la ekeston de milito pro invado en Ukrainion iniciatita de la registaro de Rusio. En malmulte da tagoj la homaro suferis jam multajn mortojn de senkulpaj homoj - interalie infanoj kaj virinoj - kaj pli ol miliono estis forpelitaj el siaj loĝlokoj. Konfirmante siajn deklarojn pri solidareco al ĉiuj, kiuj suferas pro la plago de milito, [UEA](#), subtene de ILEI, kaj nia junulara sekcio [TEJO](#) unuiĝis por starigo de **helpo-servo** responde al tiuj kondamnataj militaj agreso, kun serioza atento al tio, ke la UEA-reto enhavas la partoprenon de pli ol 240 kontaktoj en Ukrainio.

La komuna servo klopodas pripensi, kunordigi kaj efektiviigi strategiojn por helpi homojn, precipe esperantistojn kaj ties familianojn. La servo havas kiel principajn celojn:

1. esti centra ejo por akcepti kaj ligi la diversajn helpajn emojn kaj eblecojn en la Esperanto-komunumo, precipe rilate la koncernan militon;
 2. aktive kontakti esperantistojn en Ukrainio kaj atenti iliajn situaciojn kaj de ties familianoj;
 3. peri sekurajn kontaktojn inter esperantistoj, inkluzive en Ukrainio kaj Rusio;
 4. helpi en la komunikado inter homoj helpo-bezonaj kaj homoj helpo-pretaj, respektante kaj garantianta la privatecon de ambaŭ flankoj ĝis la efektiviĝo de la helpo;
 5. meti rifuĝintojn, precipe pro la milito en Ukrainio, en kontakto kun homoj pretaj loĝigi aliulojn;
 6. varbi donacojn por la **konto Espero**;
 7. identigi aliajn organizaĵojn kaj iniciatojn kun kiuj eblas kunlabori por similaj celoj;
 8. arigi volontulojn kapablajn paroli diversajn lingvojn por helpi en la komunikado kun ne-Esperanto-parolantaj homoj aŭ kun neesperantistaj helpo-celaj organizaĵoj kaj iniciatoj;
- kaj kunlabori kun Landaj Asocioj kaj Sekcioj por la celoj de la helpo-servo.

La helpo-servo funkcias pere de la retadreso helpo-servo@groups.io. Interesatoj helpi en la laborgrupo aŭ informi pri helpo-preteco, ĉu loĝiga, ĉu financa, ĉu alia, povas skribi al tiu adreso. Petoj por la konto Espero por subteno al damaĝitoj en Ukrainio aŭ rifuĝintoj en aliaj landoj, samkiel avertoj pri helpo-bezonaj homoj, precipe esperantistoj kaj ties familianoj, ankaŭ povas esti direktitaj al tiu retadreso. Tiel same konsiloj pri kunlaboro kun jam ekzistantaj neesperantistaj help-iniciatoj. Mesaĝoj senditaj al helpo-servo@groups.io restas plene privataj. Alternative, interesatoj povas rekte kontakti al Fernando Maia Jr., Vicprezidanto de UEA, respondecata pri Eksteraj Rilatoj, kiu kun TEJO kunordigas la servon, pere de la retadreso fmaiajr@gmail.com.

UEA kaj TEJO jam ekkunlaboras kun individuoj, landaj asocioj, landaj sekcioj kaj neesperantistaj internaciaj organizaĵoj por la celoj de la helpo-servo. **Pasporta Servo** estos unu el la iloj de la helpo-servo. Por donaci al la **konto Espero**, oni aliru <https://uea.org/alighoj/donacoj/espero>. La helpo-servo raportos periode pri la evoluoj de la laboroj per la komunikkanaloj de UEA kaj TEJO. Ni agnoskas, ke niaj organizaĵoj ne estas grandaj kompare kun aliaj, tamen ni provas helpi laŭ niaj ebloj per nia organiza forto, kun firma konscio pri la unikeco de Esperanto kaj la valoroj de nia movado.

Ĉiu Gazetara Komunikado de UEA estas libere uzebla laŭ la [Permesilo CC BY 4.0](https://creativecommons.org/licenses/by/4.0/).



NIAJ KURSOJ

- A **GUJAN-MESTRAS**, le vendredi de 10h à midi, cours pour débutants, au local attendant au bureau de poste de la Hume, salle de formation, 43 avenue du Maréchal de Lattre de Tassigny 33470 Gujan-Mestras. (06 95 02 85 00)
- A **CREON**, le lundi de 15h30 à 16h45 (TAP) et de 18h30 à 20h (pour adultes), et une fois par semaine au collège. Morine STRIDE (06 10 07 08 58)
- En **GALGON**, ĉiun duan vendredon de la 17a ĝis la 19a, Joël LAJUS gvidas kurson por komencantoj kaj progresantoj. (05 57 69 26 96)
- En **CENON** (Kastelo Palmer), ĉiun lundon inter la 14a kaj la 17a, Marcelo REDOULEZ animas tradukgrupon. (05 56 21 38 64)
- En **MONTENDRE**, ĉiun mardon de la 10a ĝis la 12a, Janine DUMOULIN gvidas kurson por ĉiuj niveloj. (05 46 49 07 46). **La kursoj estas portempe neokazantaj.**
- En **UNIVERSITATO BORDEAUX MONTAIGNE**, en salono D-009, ĉiun mardon de la 17a30 ĝis la 19a, kursojn gvidas Elvezio helpe de Jean-Seb. (06 72 17 22 97)

KAJTO funebras
Marian Nesse
20/10/1957- 08/02/2022



For de tenebro
kaj de funebro
l' artista anim' el or'
plu sekvos la cignon sor!


Spite al morto
Venis jam forto
por skui nin el torpor',
ĉar indas ŝi je honor'.

Sen ajna jugo
Majestas flugo
por la trobadora kor'
Nun for de dolor' kaj plor'.

Ĉu vi ne aŭdas?
Kanto ŝin laŭdas!
Muziko kaj vigla ĥor'
Vivigu ŝin je ĉiu hor'.

Al Marian,
profunde kortuŝita Marcelo
22-02-2022

A kordionistino, komponistino, MARIAN NESSE virtuoza i.a. kun **Kajto**. Ŝiajn talentojn eblis konstati aŭskultante la kanton *Soleco*¹, registritan jam sur la unua KD de la frisa muzikgrupo. Marian muzikis kaj kantis ankaŭ en aliaj grupoj. Ekzemple kun Marita en la duopo **Dames Dubbel** poste nomita **Marianta**², faka pri mezepokaj dancoj kaj kantoj. Esperant-lingve ŝi vivigis ankaŭ la grupon **Kapriol'**. Sian tutan vivon ŝi dediĉis al muziko.



Emocie ni pensu, ke la koncerto de Kajto okaze de la festo por la 50-jariĝo de Esperanto-Gironde en Cambes estis unu el la lastaj okazoj por Marian ravi esperantis-tan publikon. Dankon Marian.



Kajto à Cambes
5 mai 2018



65-jara Marian forpasis pro kancero de la pankreato. Multaj geamikoj laste omaĝe salutis ŝin, laŭ ŝia deziro, per muzikoplana ceremonio en la kapelo de Haulerwijk, frisa vilaĝo, kie ŝi loĝis.

¹Soleco (J.S. Dinwoodie / M. Nesse): <https://www.youtube.com/watch?v=WFVYTFtLLTE>
"... kie birdkantoj sonas kun la natur' en solidaro..."

²<https://marianta.home.xs4all.nl/homenl.htm>

Marcelo

FORPASIS CLAUDE NOURMONT (1945-2022)

Gazetaraj Komunikoj de UEA

N-ro 1024
2022-02-28

Claude Nourmont naskiĝis en la franca urbo Rouen la 23-an de oktobro 1945 kaj mortis la 25-an de februaro 2022. Ŝi estis Dumviva Membro de UEA, konstanta Membro de Societo Zamenhof, Honora Prezidanto de TEJO kaj Komitatano de UEA.

Ŝi esperantiĝis en 1963. Ekde tiam ŝi aktivis movade, vizitis Esperanto-renkontiĝojn, organizis kaj laboregis por Esperanto. Inter 1975 kaj 1977 ŝi estis prezidanto de TEJO. En 1973 ŝi fariĝis ĝenerala sekretario de Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE; nun Espéranto-France); inter 1994 ĝis 2001 ŝi estis prezidanto de UFE. Ŝi prezidis la Lokan Kongresan Komitaton de Montpellier (UK 1998).

Ŝi estis Komitatano de UEA ekde 1986 ĝis 2022 kaj Vicprezidanto de UEA inter 2004 ĝis 2013. Ŝi estis redaktoro de Monato (rubriko Arto, 2005-2022), ĉefredaktoro de Le Monde de l'Espéranto (2003-2022) kaj konstanta prizorganto de Kleriga Lundo dum la UK.

Ĉiame ŝi restos en nia memoro, kiel tre bonkora persono kun eterna emo kontribui, helpi, animi, pacigi kaj financi. Ŝi estis granda mecenato de Esperanto-agadoj. Kiam aliaj fermis la orelojn, ŝi ofte estis la unua, kiu donacis.

Nome de la tutmonda komunumo ni prezentas nian kondolencon al la familio kaj al la multaj geamikoj de Claude tra la mondo. Ĉiuj estas bonvenaj kondolenci en la Panteono de Edukado.net: <https://edukado.net/biblioteko/panteono?iid=246>

Ĉiu Gazetara Komunikado de UEA estas libere uzebla laŭ la Permesilo CC BY 4.0.



Espéranto-Gironde precipe memoras pri la kanzonstaĝo de la Kompanoj en Kvinpetalo en junio 2015, prepare al la Lilla UK. Kiel kutime Claude reĝe gastigis nian grupon. Ŝi zorgis pri la manĝoj de dudeko da staĝantoj kaj pri ilia komforto.

Claude, grandanima kaj sindonema virino, elstara Esperantistino, de jaroj engaĝita en UEA, France Esperanto, la revuo Le Monde de l'espéranto, estis modesta kaj diskreta, ĉiam rideta.

Ŝi plej grave aktivis en Kvinpetalo, kvankam ne komitatanino, interalie per organizo de staĝoj kaj gastigo de la staĝantoj.

Antaŭ jaroj, Claude proponis al Yannick kaj Janine partopreni en la tradukoj al la franca de la resumoj de la artikoloj de la ĉiujara IKU (Internacia Kongresa Universitato), kaj de tiam ni ĉiujare plenumas tiun ege interesan taskon, pri plej diversaj temoj.

Ni sciis ŝin malsana, kaj eksciis pri restadoj en la hospitalo, tamen ege ĉagrenis nin la novaĵo pri ŝia forpaso. Ni kompreneble partoprenas en la doloro de Brian, ŝia kunulo, prezidanto de Societo Yvonne Martinot, kiu mastrumas Kvinpetalon.

Janine

Dum la kanzonstaĝo de la Kompanoj en junio 2015



En la kuirejo, Claude preparante la manĝon kun Marcelo.



Dum la komuna manĝo, kun Marcelo kaj Bernard Legeay.

EPOSA RAKONTO PRI LA BRASENSA PROJEKTO

Teksto kaj ilustraĵoj de Serge Sire
(daŭrigo)

08

Sed ve! La kasistino klarigas ke la kosto por kopirajtoj igis l' elspeson elefanta, farante sen diskuto l' projekton tuj krevanta. Ekestis por ni ĉiuj en gorĝo dika ostoj!

Debato baldaŭ tamen stariĝas kaj eĉ vigla:

«- Nu, kiun celon havis finfine ĉi projekto?

ĉu mono aŭ kulturo superis ĉe l' koncepto?

- La mona flanko gravas sen esti punkto tikla!

Estiel asocio ni celas ne profiton

sed tamen indas saĝe eviti deficiton!

Sen eblo ĝin varigi, ĝi iĝu aĵo dona!

- Atentu vi ke dono similas ne donacon!

Ĝi sen problemoj estas kelkfoje ece mona, ekzemple per lu-donoj l' iganto nutras l' kason!

- Min iom ĝenas tamen ke oni ŝajndonacas

kondiĉe ke donacu la ricevanto sumon:

videble tio estas kaŝvendi la albumon

ne ĉiuj kontrolistoj plenplene malsagacas!

- Interesatoj simple fariĝu mem Kompanoj,

kaj dote laborilon tuj havu en la manoj!

- Ja! Ĉi tekniko estas nelica je nenio!»

Nu, sen tekniko, doto nur estas fi-manio!

(«Le mauvais sujet repenti», ne ene de l' kantaro)



09

L' «Ravino blua» estis ne blua ino rava,

sed por anarkiistoj presejo ege grava.

Nenio pli kongruus al nia trobadoro,

verkinta liberece sen fi-afekt-pudoro

Jam Mikĉjo, ĝia estro, gazetojn, librojn presis

por SATaj eldonejoj. Konsento tuj sukcesis:



kun taŭga lima dato kaj prezo tre favora,
mendiĝis senprokraste la verko trobadora.
De tiam, ve! respondis en formo kavalira
- pli ĝuste, eĉ husarda - al petoj nur silento,
neniu ajn konfirmo kaj same nek demento,
letarĝis ĉiuj mendoj en formo plej suspira.
Por Mikĉjo formalaĵoj agadis tro ĉikane.
Li plene liberigis ja plej liberecane
kaj iris ekoflegi, nun sen adrenalino,
karotojn ĉe l' nokt-bluo de l' fundo de l' ravino.

10

Post, de l' persist' ĝisnuna, l' enraviniĝo blua,
SAT kun Marcelo serĉis por isto pli kongrua,
kaj trafis iun eblan, Pamplonon apudantan,
kun prez' eĉ pli favora ol tiu ravinula.
Responde al la sendo de simpla bit-maketo
alvenis ekzemplero, ja prova, sed terura,
kun kriplaj fuŝ-literoj igantaj ĝin rubeto.
Post revizi' kaj sendo de bit-maketo nova
l' rezulto tiun fojon, ne estis katastrofa.
Post l' telefoninformo (finiĝis la presado),
Marcel', tuj iĝis sola tutSATA ambasado,
kun celo konvencii por zorgi SAT-eldonojn,
samtempe por hejmigi presitajn la kanzonojn
turisme alveturis Eŭskien. Ve! L' presisto
l' unuan bit-maketon misuzis erar-age!
Bedaŭris li l' fuŝfaron, kun honto kaj kun tristo
promesis represadon kaj sendon ja senpage.
Nu! kiu dio, kiu koboldo havas emon
persiste kontraŭstari de l' libro la alvenon?
Bonŝance post ricevo, finiĝis la koŝmaro
kaj tiel l' odiseo de la Brasens'-kantaro.

Feliĉas ja Uliso post longa vivvojaĝo

En fino sin retrovas en lando de l' junaĝo!

(« Heureux qui comme Ulysse » p.190 de l' kantaro)¹

Anarkiistoj estas ne
nepre altruistoj.

**Anarkiisto estas aparta
homo kiu skrupule strat-
trairas paseje, nur ĉar tiu
hategas la diskutojn kun
ĉiaj policistoj.**

(El intervjuo. Ne ene de l' kantaro)

Ne plu 'stas
Pireneoj



11

La koda nomo estis por ĉi iniciato

GB '2021* , en kiu oni vidas

Georgo--siglon kun l' verka naskiĝdato,

sed tiu Go-Bo fakte la anglan kaŝincitas,

ĉar por kantigi Brasens' en lingv' universala

uziĝas Esperanto, por GB spito sala!

Je dudek centimetroj per dudek unu, l' aĵo

nenorme, tute strange alprenis ĉi formaton,

per tio, tre diskrete, ĝi signas l' naskiĝdaton

(dum male l' dikec-nombro enigme restas kaŝo)!...

Post longaj kaj senfinaj tri jaroj da gravedo

provante evolui ne plu felietone,

ĝemele en centopo al sturmo de l' planedo

naskiĝis fine l' verko, papere kaj kartone...

Nu, kiam la bebo alvenis al la nesto

ni vidis ke la patro konceptis ĝin kun vesto!

(«Le bricoleur» p.62 de l' kantaro)

*(legu: GoB' dumil dudek unu)



FINO

¹ La paĝonumeroj referencas al la libro eldonita de Espéranto-Gironde *Brassens en Espéranto*. (vidu p.7 de la n-ro 166)

FASCINADO SUR KARPATA MONTO

Somera noktigo.

La nepino buligis sur la genuoj de sia avo kaj li promesas:

- Hodiaŭ vespere ni vidos ĝin. Tion mi diris jam hieraŭ kaj ankaŭ antaŭhieraŭ sed mi hodiaŭ certas. Ankaŭ ci vidos la grandan beston hodiaŭ vespere. Sed tiucele de nun tute ne plu bruu.


Li scias, ke ĝi venas ĉiunokte sed ĝis nun la kondiĉoj ne favoris por vidi ĝin.

- Jen ĝi aperas! flustras la avo kun celanta montrofringro.

La knabineto streĉas la atenton. Okuloj kaj oreloj larĝe malfermitaj. Ŝia maneto instinkte enprofundiĝas en ŝian pluŝan urseton. Kaj la avo trankviligas ŝin per mildaj vortoj. Li rakontas pri tiu mirinda besto, kiel ĝi fascinas pro sia forto, samtempe allogas kaj timigas. La giganta besto tie suverene serenas. Longan tempon la kvinjarulino observadas dum la avo fabeladas pri tri ursoj kaj blondulineto.

Multajn jarojn pasis, antaŭlonge la avo forpasis, sed iĝinte mem avino, ŝi plu emocie rakontas pri la Granda Ursino.

Marcelo (14/07/2021)





VOJAĜO AL PIRENEOJ

Victor Hugo (1843)

Dum somero 1843, Victor Hugo inkognite vojaĝis kun sia amatino Juliette Drouet al Pireneoj kaj Hispanio¹. Ili interalie etapis en Bordojo. Jen eltiraĵoj el lia rakonto.



(daŭrigo)

Kio estis tiuj figuroj? Statuoj, verŝajne. Mi prenis la lampon el la manoj de la sonorilisto kaj alproksimiĝis. Ili estis kadavroj.

En 1793 la tombejo de Saint-Michel en Bordojo estis ruinigita, kiel la aliaj. Oni elŝiris la ĉerkojn el la grundo, oni ĉiuflanken disĵetis tiun tutan polvon. Kiam la pioĉo preskaŭ atingis la fundamenton de la turo, oni surprize ne plu renkontis putrajn ĉerkojn sed kompletajn korpojn, sekigitajn kaj konservitajn de la argilo, kiu ilin kovris de tiom da jaroj. Tio inspiris la kreadon de muzeo-karnejo.

Oni instalis ĉiujn ostojn en la suba kelo de la kampanilo Saint-Michel. Tio estigis amason dekseppiede profundan, sur kiu oni alĝustigis plankon kun balustrado.

Oni kronis la tuton per la kadavroj tiel strange bonstataj, kiujn oni ĵus elterigis. Ili estis sepdek. Oni starigis ilin kontraŭ la muro en la cirkla spaco inter la balustrado kaj la murego. Ja sur tiu planko resonis miaj piedoj; ja sur tiuj ostoj mi paŝis; ja tiuj kadavroj min rigardis.

La sonorilisto alproksimiĝis al mi kaj bonvolis min alparoli: Rigardu tiun ĉi, Sinjoro, ĝi estas la numero unu. Ĝi havas ĉiujn siajn dentojn. – Vidu, kiom bone konservita estas la numero du; ĝi tamen estas preskaŭ kvarcentjara. – Koncerne al la numero tri, ŝajnas, ke ĝi spiras, kaj nin aŭdas. Ne mirinde, ĉar ĝi mortis antaŭ ne pli ol sesdek jaroj. Ĝi estas unu el la plej junaj de tie ĉi. Mi scias homojn de la urbo, kiuj lin konis.

¹: Victor Hugo, *Voyage aux Pyrénées*, Editions CAIRN, 2014

Kelkfoje, li batetis la kadavrojn per stango, kiun li tenis enmane, kaj tio sonis lede, kvazaŭ malplena valizo. Kio efektive estas la homa korpo, kiam la penso ne plu estas en ĝi, escepte malplena valizo?

Mi ne konas pli teruran vidaĵon.

Estis nigrulino pendanta je najlo per ŝnuro traigita sub la akseloj, kiu ridis al mi per hida rido. En angulo grupiĝis tuta familio, kiu mortis, laŭdire, venenita de fungoj; ili estis kvar, la patrino, kun la kapo mallevita, ŝajne provis trankviligi sian pli junan infanon, kiu agoniis inter ŝiaj genuoj; la pli aĝa filo, kies profilo konservi ion junecan, apogis sian frunton ĉe la ŝultro de sia patro. Iu virino, mortinta pro mamkancero strange faldis sian brakon, kvazaŭ por montri sian plilarĝigitan far la abomena laboro de la morto. Apud ŝi staris giganta ŝarĝisto, kiu iam vetis, ke li portos de la pordego Caillau ĝis la kajo Chartrons du mil funtojn. Li portis ilin, gajnis sian veton kaj mortis. La viron mortigitan de veto apudis viro mortigita en duelo. La spadotruo, per kiu la morto eniris, daŭre videblis dekstre sur tiu senkarna brusto.



Je kelkaj paŝoj tordiĝis kompatinda dekkvinjara infano, kiu estis, laŭdire, enterigita vivanta. Jen la klimakso de teruro. Suferis tiu fantomo. Ĝi daŭre luktis post ses cent jaroj kontraŭ la malaperinta ĉerko. Ĝi levis la kovrilon per la kranio kaj la genuo; ĝi premis la kverkan tavolon per la kalkano kaj la kubuto; ĝi rompis ĉe la vandoj siajn malesperajn ungojn; dilatiĝis ĝia brusto; la muskoloj de la kolo ture ŝvelis; ĝi kriis. Oni ne plu aŭdis tiun krion, sed oni ĝin vidis. Tio estis horora.

La lasta de la sepdek estas la plej malnova. Ĝi datumas de okcent jaroj. La sonorilisto rimarkigis al mi ĝiajn dentojn kaj harojn. Apude estis infaneto.

- Sinjoro, diris la viro, kiom ili estas bone konservitaj!

Neniam mi pli bone sentis ol en tiu momento la vanecon de ĉio, kio nin paŝigas. Kia poemo, tiu turo Saint-Michel! kia kontrasto kaj kia instruo! Sur ĝia pinto, en la lumo kaj en la suno, meze de la bluo de la ĉielo, videbla de la klopodema homamaso, kiu svarmas sur la stratoj, telegrafo, kiu svingiĝas, diras kaj detaligas ĉiujn senvalorajojn de la ĉitaga historio kaj de la politiko de la kvaronhoro, ĉiujn fiaĵetojn, el kiuj konsistas la homo kiu pasas, kaj la momenton kiu forfuĝas – kaj dume, je ĝia bazo, meze de la masivo sur kiu la turo sin apogas, en kriptoj, kie alvenas neniu radio, neniu bruo, konsilio de fantomoj, cirkle sidantaj en la obskuro, mallaŭte parolas pri la tombo kaj la eterneco.

FINO de la epizodo

Adaptis kaj esperantigis Janine

ESTRARO
de
«ESPÉRANTO-GIRONDE»

* * * * *

Centre Culturel Château Palmer
33150 CENON

* * * * *

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**
Université de Bordeaux Montaigne

UFR Langues,

Domaine Universitaire, Esplanade des Antilles,
33600 Pessac

Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**

2, chemin des Nauves

Chardes 17130 MONTENDRE

Tel: 05 46 49 07 46 / janinedum@neuf.fr

Kasistino: **Martine EDELBLOUDE**

2 rue Raymond Lavigne

33100 BORDEAUX

Tel: 06 73 34 81 88 / mabel1533@laposte.net

* * * * *

**Kontribuojn por LEGI bv. sendi al janinedum@neuf.fr
aŭ al esperanto.gironde@free.fr**

**La venonta kunveno de Espéranto-Gironde okazos
sabaton, la 23an de aprilo, je la 10a30
en teatro Simone Signoret en Cenon.**

